

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 5.
Maj 1914.

Redaktör:
R. PEHRSSON
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND
Gävle.

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspris 5 öre pr mm.



La Balta Ekspozicio en Malmö 1914.

15 Majo--30 Septembro.

La Balta Ekspozicio en Malmö 1914, en kiu partoprenas Svedujo, Danujo, Germanujo kaj Ruslando, fariĝos la plej bela kaj granda ekspozicio ĝis nun okazinta en la nordaj landoj. Ĝi estas lokita je distanco de 5—6 minutoj de la centra stacidomo kaj la haveno de Malmö, sudokcidente de la urbo, kaj okupas entute pli ol 51 hektarojn kun ĉirkaŭo de kvarono da sveda mejlo.

Grandega viadukto el ligno — 420 metrojn longa — kondukas al la placo antaŭ la ĉefenirejo, sur kiu alveturas la elektraj vagonoj. Interne de la ĉefenirejo estas ambaŭflanke de antaŭkorto la konstruaĵoj de ekspedejo, komisarejo k. t. p. kaj kontraŭe altiĝas la kolosa rigardeja turo de la ekspozicio — la plej granda el ligno konstruita turo de la mondo — ĝis alteco de 87 metroj. El supre de la turo, kien kondukas liftoj, oni havas mirindan perspektivon de Skåne, Öresund, Danujo kaj la ekspozicio kun ĝiaj »Baltaj» konstruaĵoj -- blankaj muroj, ruĝaj tegoltegmento kaj ŝtuparhavantaj frontonoj — kaj malsupre

de la turo estas la ekspozicioj de la urbo Malmö kaj la provinco de Malmöhus.

La plej centra placo de la ekspozicio estas la granda Centra Korto, belega aranĝaĵo, diametre 150 metrojn granda, kun verdantaj rabatoj ĉirkaŭe kaj en la mezo 36 metrojn larĝa fontano, el kiu supreniĝas grandioza ŝprucakvo ĝis alteco de 10 metroj. Ĉirkaŭ la Centra Korto estas arkadoj, kaj apud ĝi troviĝas la ekspozicia ĉefrestoracio, la maŝinhalo, kiu okupas spacon de 10,200 kvadratmetroj, la kongreshalo, en kiu la ekspozicio malfermiĝos, la industrihalo — la plej granda ligna halo de la mondo; ĝi okupas 22,000 kvadratmetrojn — la belaj kaj gravaj ekspoziciaj konstruaĵoj de Germanujo, Danujo kaj Ruslando kaj la Balta restoracio.

Tra arkadoj kaj belega arkada trapasejo la vojo kondukas al la lagoj, la Granda Lago — 126,500 kvadratmetrojn — apud kiu estas la granda halo de fiŝkaptado, la bela restoracio »la Kastelo», kaj la Arthala Lago — 16,500 kvadratmetrojn — apud kiu leviĝas la bela arthalo kun pli ol 41 metrojn alta turo, haloj por skulptarto, kvindeko da ĉambregoj por pentrarto kaj teĉambro kun florornamita pergolo kaj baseno.

Vaste etendiĝas la mirinde bela parko kun la ekspozicio de la germana Werdandibund kaj la krematorio, Ārsta, — la ekspozicio de la svedaj virinoj — kaj la ekspozicio de la svedaj fervojoj. Interne de grandega brikmuro vi trovos la reĝan parkon kun la florstrato de la Kronprincino, aranĝaĵo de la plej rava efiko, la reĝa pavilono kaj malantaŭ ĉi tiu sur la supro de monto la ekspozicio de ĉasado. De la monto

torentas malsupren de ĝiaj terasoj belega akvofalo, kaj en la monton kondukas grotoj ĝis la brilaj kaskadoj de la »falo».

La veturado daŭriĝas poste en haloj preter baseno kun florornamita akvosupraĵo kaj tra idiliaj kortetoj en plej riĉa kolorornamo al la Centra Korto kaj la ekster ĝi lokita kampo por la multaj privataj ekspozicioj kaj la vivplena kaj interesa kampo de amuzajoj, kiu etendiĝas malproksimen al la Granda Lago, sur kiu senĉese glitas antaŭen la boatoj, kaj en kies akvo en la somervesperoj sin spegulas miloj kaj miloj da lumoj por plibeligi la multvarian brilegon de la Balta somera fabelajo.



Sveda kroniko.

Boden. — De tiu loko venas la ĝojiga sciigo, ke de post kelka tempo okazas tie kurso en Esperanto, gvidata de nia sindona samideano s-ro Hj. Lindstedt. Dek personoj partoprenas en la kurso. »Tio estas la rezulto de la propagando, kiun mi provis fari», skribas s-ro L. »Kvankam la cifero estas kompare malalta, oni tamen rajtas rigardi la aliĝon bona, ĉar Esperanto estas ankoraŭ preskaŭ nekonata tie ĉi en la nordo». — Jes, ni bezonas ĉie tiajn samideanojn kiel s-ro Lindstedt!

Borås.

Raporto.

Konsiderante, ke oni devas obei la admonon faritan de la redakcio de »La Espero», nome, kiel eble plej detale raporti en »La Espero» pri la vivo en la kluboj esperantistaj, mi ree petas la estimatan redakcion pri loko por la jena raporto.

Ĝis nun nia klubo konservis la vigecon en sia laboro. La membroj, precipe la junaj, ne nur diligente vizitas la kursvesperojn kaj aliajn kunvenojn, sed ili ankaŭ per ekskursoj k. a. vekas apartan interon por la klubo, tiamaniere samtempe kunligante la klubanojn pli forte, pli intime. Plie, dum la ekskursoj oni ja ankaŭ havas bonan okazon pli neĝenate uzi nian karan lingvon; tio precipe koncernas la komencantojn; oni ankaŭ pli facile

trovas temojn priparolatajn. La printempaj tagoj, kiuj plenigas la homan koron per precipa ĝojo pri la foriro de l' malvarma vintro kaj pri la alveno de la belaj sezonoj, siaflanke invitas ĉiujn al promenadoj en la liberan naturon. Ĉe la unua ekskurso, kiun ni faris la 25-an de Marto, oni esprimis la deziron ofte fari tiajn promenadojn, migradojn en la belan ĉirkaŭaĵon de Borås. Kaj la deziro plenumiĝis. La 5-an de Aprilo ni faris promenadon al la bele ĉe la Öresjö lokita Almenäs kaj la 3-an de Majo la klubo ekskursis al la plej alta loko en la ĉirkaŭaĵo de Borås, nome, al »Hyberget». Ĝuinte la belan perspektivon de la turo, kiu estas starigita sur la pinto de la »monto», oni pasigis iom da tempo per liberaeraj ludoj. En la vilaĝa kafejo Kronäng oni pasigis kelkajn horojn per kafotrinkado, laŭtlegado de esperantaj rakontoj kaj humoraĵoj, ludoj k. t. p.

Reirante al la urbo ni dumvoje faris mallongan viziton ĉe la malnova vilaĝa preĝejo Brämhult kaj daŭrigis poste la marŝadon tra la arbaro al Borås. Ni forlasis la urbon je la 9-a antaŭtagmeze kaj revenis je la 4-a posttagmeze. En la ekskurso partoprenis 17 membroj.

Sed ne nur pri agrablajoj mi povas rakonti. Bedaŭrinde kelkaj el niaj plej fervoraj kaj lertaj klubanoj post kelkaj tagoj estos forlasintaj Borås-on kaj nian klubon. Estas granda perdo por ni. Jam s-ro Joh. Magnusson nin forlasis; li transmigris Anglujon, kie li ricevis oficon en Manchester. S-ro Emil Pausch translokiĝos al Gefle, kie li trovis oficon en Gefle Ängväfveri kaj s-ro Lindström ŝanĝos sian oficon tie ĉi kun alia en Styrso (Gotenburgo). Konsilo ja estas, ke ili ĉiuokaze troviĝos en »Esperantujo»; du el ili eĉ restos en nia lando, sed tamen, por nia klubo estas ne malgranda perdo.

Al ili ĉiuj ni deziras ĉion bonan kaj tutkore ni esperas, ke ili ĉiam restu fidelaj esperantistoj kaj trovu novajn amikojn sur la novaj lokoj.

Kun samideanaj salutoj

Otto Roesel.

Norrköping.

Printempa ekskurso.

Frue matene mi vekigis. Nia klubo estis decidinta fari ekskurson en la sankta vendredo. La mateno estis bela kaj la vetero estis vera

ekskurs-vetero. Mi gaje elkuris el la lito kaj min rapide vestis. Mi ja devis vekti la membrojn kaj tio estis nefacila laboro. Ni decidis foriron je la sesa horo matene, sed je la sepa, kiam ni komencis la ekskurson, ne ĉiuj la membroj do estis venintaj. Ni estis nur naŭ, kiuj eliris el la urbo kaj marŝis en la naturon. Ĉio estis tiel bela, ke oni tute ne povis ĝin imagi al si. Ni iris preter blanka preĝejo, preter dometoj, ĝardenoj, kampoj kaj arbaretoj, kiuj ĉie estis plenaj de printempa beleco. En la arbaretoj ni aŭdis multajn birdojn, kiuj gaje pepis kaj kantadis. Ni mem kantis kelkajn kantojn kaj ŝercis inter ni. Baldaŭ ni estis longvoje de nia urbo, la fabrikplena *Norrköping* kaj post du horojn ni venis al *Okna*. Tie ni haltis en bieno, kie ni estis bonvenintaj dank' al la familio, kiu posedis la bienon. Post kafotrinko ni nin diversmaniere gajigis dum kelke da horoj. Inter alie ni estis apud la lago *Glan*. Ĝi estas tre bela lago, trafluata de »*Motala Ström*», kiu ankaŭ trafluas *Norrköping*. Tie estis ĉarnaj bordoj kaj tie nia fotografisto Östling prenis bildon de ni. Li antaŭe ankaŭ fotografis nin post la kafotrinko. Tiel ni havis belan kaj dolĉan tempon, sed fine ni do estis lacaj kaj devis uzi la fervojon por hejmen veni. Post mallonga tempo ni ree estis en nia urbo.

Estas mirinde, kiel tiaj ekskursoj povas doni forton kaj entuziasmon por la kluba laboro. Ni devos alifoje fari similan ekskurson. Mi do esperas, ke tiam ĉiuj la membroj alvenos. Oni ja povas uzi tiajn ekskursojn direkte por instruado, se Esperanto dum la vojaĝtempo estas uzata en interparolado. En Anglujo estas ofte tiaj ekskursoj por esperanta instruado farataj.

Leander Tell.



Riĉeco kaj scienco. Riĉulo foje demandis scienculon, kial oni tiel ofte povas vidi scienculojn ĉe riĉuloj, dum oni nur malofte vidas la riĉulojn ĉe la scienculoj. »Nu», respondis la alia, »la scienculoj konas la valoron de riĉeco, male la riĉuloj ne konas la valoron de scienco».

»Antaŭen.»

Pri l'instruado Esperanta.

Kiam mi komencis mian esperantan instruon, mi prove volis la saman metodon en tia instruado uzi, kiun mi uzas instruante alilingve, kaj mi nun povas diri, ke la afero iras perfekte bone.

Kiel mi agas?

La instruado komenciĝas per klarigojn de Esperanto kaj la konstruado de la lingvo. Por alvoko de l'intereso mi kutime donas al la lernantoj bildkartojn el la landoj, je kiuj ili havas intereson, kartojn de esperantistoj, kiuj volonte korespondadas kun komencantoj. Post tio la reala kurso komenciĝas. Unue la lernantoj ricevas malgrandajn vortarojn, gramatiklibrojn kaj legolibrojn. (En mia lasta kurso mi uzis tiajn libroj: O. W. Hjærtstædt: Esperantisk-Svensk & Svensk-Esperantisk Ordbok [0.60 kr.] O. W. Hjærtstædt: Esperanto-språklära [0.06 kr.] kaj J. Borel: Legolibreto [0.20 kr.]) Poste mi donas simplan legpecon kaj la alfabeton esperantan leciono. Sekvantan lecionon la lernantoj ricevas leciono simplan legpecon, ĉapitron pri la substantivoj kaj svedan tekston (anekdoton aŭ a.) por traduko esperanta. En tia teksto mi intence havas propoziciojn, kiuj estas tiel simplaj, ke la lernantoj ilin povas traduki per tio, kiun ili jam lernis. Tiel mi poste samtempe kun leg kaj traduklecionoj komentarias kaj donas gramatiklecionojn ĝis la lernantoj scias la esperantan gramatikon, la tradukaĵoj estas iom post iom pli mal-simplaj. Samtempe la lernantoj ekzerciĝas pli kaj pli ĝis ili fine estas veraj esperantistoj. Kompreneble la instruisto ĉiam donas informojn, klarigojn kaj korektaĵojn. Dum tiaj ekzercoj la lernantoj estas en fervora korespondado kun esperantistoj alilande. Fine estas interparoloj esperantaj uzataj, kaj anstataŭ la legolibreto estas pli granda verko legata, ekz. dramo (Mi uzis »Hamleton» de nia Zamenhof). Tiel la instruado iras! Kaj mi povas diri, ke tia kurso estas unu el la plej bonaj. Oni kompreneble pro tio bezonas tempon, eble ne mallongan tempon, sed do estas ankaŭ la rezultato bona.



Skemo

de l'instruado esperanta.

1:a leciono:

La alfabeto kaj simpla legpeco.

2:a leciono:

La artikoloj, la deklinacio de la substantivoj, la nuntempo de la verboj (kun klarigo de l'infinitivo), simpla legpeco kaj el sveda teksto traduko esperanten.

3:a leciono:

La adjektivoj (deklino kaj komparacio), la imperfekto de la verboj, legpeco kaj traduko.

4:a leciono

La personaj pronomoj, perfekto kaj pluskvamperfekto de la verboj (klarigo de »-is»), legpeco kaj traduko.

5:e leciono

La numervortoj, estonttempoj de la verboj, legpeco kaj traduko.

6:a leciono:

Adverboj, konjunkcioj, prepozicioj, legpeco kaj traduko.

7:a leciono:

La posedaj pronomoj, la demonstrativoj, legpeco kaj traduko.

8:a leciono:

La pasivo de la verboj, la konjunktivo, legpeco kaj traduko.

9:a leciono:

La relativaj pronomoj (kun la relativaj ankaŭ la demandaj pronomoj), legpeco kaj traduko.

10:a leciono:

Ĝeneralaj (retrarigardoj, prefiks-kaj sufiksklarigoj k. t. p.) legpeco kaj traduko.



Esperanto i handels tjänst.

En Berlinerfirma i järn- och stålvarubranschen annonserade för någon tid sedan i tre Esperantotidskrifter om några specialartiklar. Genom dessa annonser har firman tills dato erhållit 425 större eller mindre beställningar från 32 olika land. Så t. ex. kom från Persien en större beställning på fick- och väckarur och ett stort antal ficklampsbatterier; från Kina en beställning på verktyg o. s. v. Detta resultat visar tydligt Esperantos faktiska utbredning.



Amerika.

Argentina. — Esperanto har på sista tiden gjort stora framsteg i staden *Rosario de Santa Fe*, och en mängd föredrag och kurser ha hållits. Den 15 februari invigdes med stor ståt Argentinska Esperantoförbundet. — I *Bahia Blanca* har en ny kurs öppnats.

Kuba. — Kubanska föreningen för spridande av Esperanto har till ordförande valt den framstående författaren dr. Mariano Machado, f. d. ambassadör i Chile.

Asien.

Kina. — Kinesiska Esperantoförbundets centralbyrå har lämnat nedanstående statistiska redogörelse för sin verksamhet under de två år den existerat.

	1912	1913
Mottagna förändelser	2411	5039
Avsända	3192	6113
Filialer i landet	17	28
Medlemmar	396	919
Sålda »korrespondenskurser»	1230	2650

Dessa siffror visa långt bättre än ord, vilka framsteg Esperantorörelsen under den sista tiden gjort i Kina.

Europa.

Bulgarien. — Den bulgariska Esperantorörelsen börjar nu repa sig efter det avbräck den lidit genom kriget och dess följder. Kurser ha öppnats i Ruschuk, Chaskov och Viddin, varjämte förtjänar att nämnas, att även dagspressen börjar befatta sig med Esperanto.

Frankrike. — Franska poststyrelsen har givit sitt tillstånd till öppnande av en Esperantokurs för dess tjänstemän. Kursen, som äger rum i av postverket upplåtta lokaler, är avsedd att utbilda ett tillräckligt antal Esperantokunniga posttjänstemän till världskongressen. — I *La Roche-sur-Yon* har öppnats dels en offentlig kurs med ett 60-tal deltagare, dels en i därvarande läroverk, i vilken 23 av läroverkets lärjungar deltaga.

Holland. — De holländska esperantistiska järnvägsmännen ha haft ett gemensamt möte i Haag. De beslutade härvid sammansluta sig

till en förening, för att sprida Esperanto bland järnvägsmännen, vilket ej torde möta så stora svårigheter, då dessa inse att detta är enda möjligheten att övervinna de olägenheter, som vållas av språkolikheten hos de resande på de holländska banorna.

Italien. — Nya kurser ha öppnats i *Milano, Venedig, Verona* (för präster) och vid folkhögskolan *Este*.

Portugal. — Under namn av »Lisbona Esperantista Societo» har i Lissabon bildats en ny Esperantoförening, räknande ett 50-tal medlemmar. Den nya föreningen hade nyligen sitt första offentliga propagandamöte, som blev en stor framgång för Esperanto.

Ryssland. — En mängd föredrag om Esperanto ha hållits på skilda platser; de flesta med den påföljd, att kurser ha öppnats och nya föreningar bildats. Bland de nya kurserna märkas bl. a. en i *Astrakan*, två i *Charkov*, två i *Kiev* och en i *Moskva*. I det högre juridiska seminariet i *Jaroslav* har bildats en Esperanto-sektion. I *Ufa* har med rektorns tillstånd hållits Esperantokurser i gymnasiet, i vilka över 100 lärjungar deltagit.

Spanien. — Tidningen »Publicidad» i Barcelona, som sedan flera år tillbaka har en särskild Esperanto-avdelning, publicerade nyligen en artikel, vari gives uttryck åt den meningen, att tiden nu är inne för sammankallande av en internationell kongress, varå regeringarna skulle avhandla frågan om antagande av Esperanto som internationellt diplomatiskt språk, som kongressspråk för internationella kongresser etc.

Tyskland. — Direktionen för den bekanta kurorten *Ems* har utgivit ett elegant illustrerat prospekt på Esperanto. — Vid tyska lärareförbundets årsmöte, som hålles i *Kiel* i pingst, kommer ett särskilt möte för esperantistiska lärare. — I *Dresden* har ett antal poliskonstaplar undervisats i Esperanto och examen hölls nyligen med dem inför polismästaren och högre tjänstemän. — Två framstående esperantister och fredsvänner, dr. Giesswein från Budapest och Nobelpristagaren prof. Richet, Paris, talade nyligen i fredsföreningen i *Stuttgart*. Dr. Giesswein förordade varmt i sitt föredrag och prof. Richet gjorde propaganda för språket genom att använda det vid samspråk med närvarande esperantister.

Nya föreningar ha bildats i *Hamburg v. d. Höhe-Kirdorf, Köln* (för lärare), *Tailfingen* och *Wilhelmshafen-Rüstringen*.



Esperanto i Kina.

I en artikel i den i Shanghai utkommande tidningen »North China Daily News» redogöres för den kinesiska Esperantorörelsens ställning för närvarande. Artikeln är fullkomligt opartiskt skriven och utgör endast en skildring av det arbete som Esperantos pionärer i det stora kinesiska riket utfört under de sista åren.

Artikeln författare konstaterar först, att Esperanto sedan tio år tillbaka kunnat glädja sig åt en ständig spridning i Kina. Och dess framtid har ända tills på sista tiden tätt sig i de ljusaste färger. Esperanto blev genast vid sitt framträdande gynnsamt mottaget av den dåvarande regeringen och förre undervisningsministern, *Tai*, skänkte det fullständigt sitt gillande. År 1903 började intresset för språket bli allmänt och man grundade i Shanghai en Esperantoskola. De följande åren gjorde Esperantorörelsen stora framsteg i Kina, bl. a. bland de protestantiska missionärerna. En av dem, pastor G. H. Hubbard, utgav t. o. m. en esperantisk tidning, i vilken han bl. a. framlade ett förslag, att skriva det kinesiska språket (som ju icke har något motsvarande vårt alfabet) medelst de fonetiska esperantiska bokstäverna. 1910 bildades Esperantoföreningar i åtskilliga städer: *Peking, Mukden, Shanghai, Chiu-kiang, Chang-sa, Koang-cheu*; kurser öppnades och man arbetade flitigt på att sprida det nya språket. Emedan det lätt kunde läras per korrespondens, användes detta sätt i stor omfattning. Föredrag hölles överallt och esperantisk litteratur spriddes; särskilt må härvid nämnas den esperantiska översättningen av Nya Testamentet, utgivet av det stora brittiska bibelsällskapet.

Det mest anmärkningsvärda i rörelsens framträdande i Kina, anser författaren grundandet av en esperantisk press vara. Flera tidningar har utkommit från skilda håll. Den första var »kinesiske socialisterna» som dess esperantiska namn skulle

heta på svenska, men vars kinesiska namn, »Rentao», betyder människokärlek. Den predikade främst Tolstoys läror, varjämte den ofta citerade de gamla kinesiska filosoferna, Kon-fu-Tze (Confucius), Muh-Tze och Lao-Tze. Dess namn gjorde emellertid att den sågs med oblidiga ögon av regeringen och sedan dess lokaler under juli-upproret mot Juan-Shi-kai råkade bli häftigt bombarderade, upphörde den.

Sedan någon tid tillbaka finnes emellertid en annan tidning, »La voço de popolo» (Folkets röst), som till en början utgavs från Kanton. Den förordar ett slags fredlig anarki, men är annars opolitisk. Det är emellertid ej överraskande om Kantonregeringen under dåvarande situation — södra upproret hade just undertryckts — ej gillade dess idéer. Tidningen blev därför konfiskerad. Denna flyttade då till Macao, där regeringens hand ej nådde den och varifrån den ännu utkommer. Denna plats var också ganska lämplig, enär där redan förut fanns en esperantisk skola.

Författaren uttalar slutligen som sin åsikt, att ansträngningarna under den närmaste framtiden kommer att inrikta sig på, att få Esperanto infört i de kinesiska skolorna.

»La Revuo».



På sjukhuset.

En dag för någon tid sedan insjuknade helt plötsligt en utlänning — en ungrare, — som för tillfället befann sig i Paris och fördes till ett sjukhus. Främlingen kunde inte ett ord franska och sköterskepersonalen var i samma situation i fråga om ungerskan. Man kan förstå hur svårt samtalet blev. Då kom plötsligt en av sköterskorna på tanken att använda Esperanto för att tala med den sjuke. Ett leende lyste då upp dennes ansikte. Han förstod! Samtalet fortsatte på detta språk. Den sjuke var ej längre ensam.

Händelser, sådana som ovanstående, vittna på ett slående sätt om huru man när man minst anar det, kan ha nytta av Esperanto. Låt vara att de ej äro vardagliga än så länge, men deras antal ökas ständigt.

Tankar i världsspråksfrågan.

Min åsikt är bekant: den är till favör för ett internationellt språk. Så vitt jag är i stånd att bedöma en sådan fråga, anser jag att den lösning Esperanto lämnat, är lyckad och praktisk. Det har enkelhetens och regelbundenhetens fördel. För detsamma talar också det för varje dag växande antal personer, tillhörande de mest skilda klasser, som antaga det. Det visar sin livskraft genom sin spridning.

Henry La Fontaine,
Nobelpristagare 1913.

»Att ett konstgjort språk av något som helst slag, även om det vore utarbetat av det största snille, skulle erätta världens stora levande språk, tror jag ingen förnuftig människa skulle vilja påstå. Esperanto gör inga sådana anspråk, utan avser endast att vara ett lämpligt meddelelsemedel mellan dem som under förhandenvarande omständigheter finna det svårt eller omöjligt att direkt meddela sig med varandra. Latinet, en gång gemensamt för den civiliserade världens alla lärde, har kommit ur bruket.

Det skall aldrig återuppstå som ett medel för språkliga förbindelser. De flesta lärare ha någon insikt tre eller fyra av världsspråken. Men en sådan insikt i ett fåtal språk, om också i de mest utbredda, undanrödjer icke behovet av ett enkelt och lätt medel för folk allmänhet att meddela sig med varandra.

Detta medel synes Esperanto lämna oss. Min allvarliga uppmärksamhet fästes vid det för första gången för åtskilliga år tillbaka, då jag satt såsom ordförande vid vissa möten på en internationell kongress. Flera föredrag föredrogos på Esperanto och jag överraskades av att finna hur mycket jag kunde förstå blott och bart genom min kunskap i åtskilliga språk som allmänt talas i Europa. Jag tror, att användningen av detta språk skall tilltaga i förvånande grad och att det kommer att tjäna icke som ett ersättningsmedel men som ett nyttigt supplement till de skilda språk som växt upp jämsides med nationernas utveckling och som naturligtvis ha

egenskaper, som intet konstgjort språk strävar att ha eller kan väntas ha.»

Georg Stuart Fullerton.

Prof. filosofi vid Wisconsin.

»The British Esperantist.»



Baltaj Esperantistaj tagoj en Malmö 26—29 Julio 1914.

Bonvenon, Samideanoj!

La sveda esperantistaro invitas siajn fremdlandajn gefratojn viziti la urbon Malmö dum la Baltaj Esperantista Semajno, kiu okazos tie 26—29 Julio

Certe multaj samideanoj el la »Baltaj» landoj, precipe Danoj kaj Germanoj, intencas viziti la Baltan Ekspozicion. Estas nia varma deziro kaj modesta espero, ke ili prokrastu sian vojaĝon, ĝis okazos niaj »tagoj», ĉar, *agante tiamaniere, ili samtempe helpas al nia esperanta propagando en Malmö.*

Malmö, la tria urbo de nia lando kaj la ĉefurbo de plej suda Svedujo, havas pli ol 100,000 loĝantojn. Tamen bedaŭrinde la esperanta movado en tiu urbo estas tre malforta; dum la lastaj jaroj tie ne sonis eĉ unu vorto esperanta. Tia stato plu ne devas daŭri. Konsciaj pri tio, la izolaj samideanoj en Malmö lastatempe laboris por revivigi antaŭe ekzistintan klubon, kaj iliaj penadoj laŭŝajne bone sukcesis. Antaŭ kelke da tempo malfermiĝis kursoj, en kiuj partoprenas 60 personoj, inter ili 25 lernantinoj el la popola lernejo. Sed ni nun prizorgu, ke tiu grava semado ne estu senfrukta! Ĝermu el ĝi granda arbo, kiu per siaj branĉoj ampleksos la tutan Sud-Svedujon kaj estonte portos la plej belajn kaj bonajn fruktojn!

Ĉu vi, karaj samideanoj, volas helpi al tio? — Se jes, vizitu do grandare la urbon Malmö kun ĝia bela ekspozicio dum niaj »Baltaj Esperantistaj Tagoj».

Sveda Esperantista Federacio decidis, ke la jarkunveno de la Federacio havos lokon en Malmö samtempe kun la »Baltaj Esperantistaj Tagoj». Do samideanoj el tuta

Svedujo devas ekkapti la tre favoran okazon samtempe viziti la »Baltan Ekspozicion», la plej grandan ĝis nun okazintan en nia lando, kaj ĝui neforgeseblan tagojn inter esperantistaj gefratoj.

Estas preferinde, ke vi anoncu jam nun vian aliĝon, sendante la kotizon de tri (3) kronoj (Sm.1: 65) al Sinjoro Carl Rosengren (Kasisto de la loka komitato), Amiralsgatan 15, Malmö (Svedujo).

Sinjoro G. H. Backman (adr.: Helsingborg, Svedujo), al kiu estas komisiite aranĝi la esperantan ekspozicion de la »Tagoj» danke akceptas ĉiajn esperantaĵojn.

Ĉiuj esperantaj ĵurnaloj bonvole enpresigu ĉi tiun inviton!

Kun samideana saluto

La komitato de »La Baltaj Esperantistaj Tagoj».



Provizora programo de la Baltaj Esperantistaj Tagoj.

- 26 Julio. Akcepto de la fremdaj esperantistoj. Vizito al la Balta Ekspozicio. (Pli-malaltigo de la biletprezoj ricevebla). Kongresa kunveno.
- 27 Vizito al la Ekspozicio. Propaganda parolado. Vizito al la Esp. Ekspozicio.
- 28 Aŭtomobila rondveturo tra la urbo kaj vizito al la Ekspozicio. Kongresa kunveno.
- 29 Ekskurso al la fagarbaro. Parolado k. t. p.



Junulo (kiu ĵus estas vizitinta sian amatinon: — Mi ne povas pli longe prokrasti, mia kara. Mi vere estis devigata telefoni. Ĉu vi edziniĝos kun mi?

Dolĉa voĉo: Certe, mi faros ĝin, sed ĉu vi ne havas malĝustan numeron?

»Amerika Esperantisto.»

La plej potenca paco- ligo de la mondo.

De redaktoro J. L. Saxon.

La granda popolbuĉado estas finita. Li ne estas reveninta al la kazerno. Tial ŝi iras serĉi lin. Fine ŝi lin trovas. Ŝi diras ĉiujn la mildajn vortojn, kiujn la amo instruis al ŝi kaj kiuj ĉiam briligis lian vizaĝon. Ŝi karesas lian palan vangon. Sed li estas same muta kaj malvarma kiel la ruso, kiu dormas la lastan dormon apud lia brusto.

Ŝi ne rimarkas, ke la vespero estas venonta kaj ke la tendaraj fajroj ekbruliĝas. Ŝi nur scias, ke ŝi mortos ĉe li. Kio estis? Ĉu ne estis io, kio sin movis?

Ŝi ĉirkaŭen rigardas. Klinigita apud la ruso sidas juna rusino, tremanta de ploro.

»Fratino«, la japanino diras, tre amas lin?»

»Li estis mia ĉio. Mi estis sola — sen parencoj, sen amikoj. Tiam li venis kaj faris min la plej feliĉa virino en la mondon. Kiam li estis vokata al la milito, mi akompanis lin — tiel, mi komprenas, ankaŭ vi faris. Kaj nun...»

»Feliĉa vi, kiu estas sola pri via funebro,« diris la japanino. »Mia amato havas patrinon, kiu ploras sin blinda kaj patro kiu malesperos. Kaj mi mortos ĉe li.»

»Ne, fratino,« subite diris la rusino, »ni vivos!«

»Kial ni vivos?« demandis la japanino balancante la kapon.

»Jes, mi ricevis novan ideon, kiam mi vidas vin antaŭ mi tie ĉi,« respondis la rusino, metante la brakon ĉirkaŭ la talio de la japanino kaj levigante ŝin. Ni fondos ligan tie ĉi, ĉe la kadavroj de niaj amatoj kaj eliras en la mondon kun mano en mano, por efektiviĝi ĝian problemon!»

»Ligo?« mire diris la japanino.

»Jes, fratineto, la plej potenca pacoligo en la mondo.»

La japanino ridetis tra la larmoj kaj metis sian manon en la mano de la rusino.

»Ni estas la ĝustaj fondi tian ligan,« diris la rusino, »ni, kiuj estis devigataj rigardi tiun ĉi sensencan amasmortigo-dramon, kiu en skandaleco estas sen simileco en la historio. Ni, kiuj suferas plej multe sub la premado de la batalemo de niaj potenculoj kaj sub la severega

indiferento, kun kio la tuta mondo rigardas tian teruron sen limo — ni estas la ĝustaj, eliri en la mondon kaj forigi la militojn.»

»Via diro devas esti prava, fratino,« respondis la japanino kaj rigardis songanta antaŭen. »Dum kiam la laŭte elparolita pacoamo de la regantoj montras sin en proponoj pri novaj pli grandaj militadkazeroj, kiam la diplomatoj spionas unu la alian, kiam la parlamentanoj paroladas ĉe festofestenoj kaj la plimulto de la gazetaro venenas la sentojn de la homoj per falsaj ideoj pri honoro kaj patrolando, tiam ni iras trankvile al la patrinoj, al la fianĉinoj, al la fratinoj ĉie en la mondo kaj instruas ilin, ke milito nur estas malagrabra songo, kiu estos finita en la sama momento, kiam ni virinoj ĉesas kredi je ĝi.»

»Fratino, ni admonos la virinojn ne okazigi al si tempon elparoli la senpensaj kaj sensignifaj vortoj. Ili ne devas permesi al si tiom, dum kiam la tuta mondo sopiras ilian helpon.»

»Vi estas prava. Ni forparolu, forkanti, forploru la militon — ni ne lasos ian rimedon neprovita.»

»Fratino, ni antaŭ ĉio memoru unu aferon: al ĉiu homo estas donata periodo, kiam ŝia patrino estas ĉiom por li, ni do admonos la patrinojn uzi tian influon — la plej grandan influon, kiun homo povas havi je alia homo. La patrinoj, kiuj kun doloro naskis la infanojn, kaj kiuj amas sian vivofrukton same multe kiel sian propran vivon, komprenos la frenezajon en tiu krimo, oferi siajn plej karajn al la Moloko de la milito.»

»Kiam nia voĉo estos sufiĉe mola, nia koro sufiĉe varma, nia okulo sufiĉe klara, neni viro plu bezonos lerni la abomenindan kaj senmoraligantan metion de la milito, kaj ankoraŭ pli malmulte eliri militon. La sango de Abel ne pli longe estos permesita voki el la tero, kiam ni povas malhelpi tion.»

La penso ke lipoj, kiuj kisis iliajn proprajn, brakoj, kiuj ĉirkaŭprenis ilin, estos nutraĵo por rabbestoj, estas por ili nesuferebla. Unu nun iras por alporti fosilojn, dum la alia restas por gardi la mortintojn el la plej malagrablaj rabbestoj de la bataalkampo, la kadavrorabistoj.

Silentaj ili fosas. Kiam ili estas pretaj ili prenas kiel multekostajn sanktajn restaĵojn kion la mortintoj havas en la poŝoj. Sed la ringojn ili lasas restantaj je la manoj.

Kiam ili dormas la lastan dormon ili ne senestos la fidelecpromesojn de siaj amatoj. Kaj ili kuŝigas ilin, per siaj propraj manoj en la brusto de la patrino tero.

Kaj kiam ili iras hejmen, kun mano en mano, la nova matenruĝiĝo alvenas.

El la sveda
E. Adamson.



Libroj kaj gazetoj.

La dogmaro pri la Vivo por la Nova Jerusalemo. — De E. Swedenborg, tradukita el la latina lingvo de H. B. Mudie.

Estas konata fakto, ke dum Emanuel Swedenborg tie ĉi, en sia hejmlando, ĝenerale estas rigardata kiel fantazia mistikulo, oni eksterlande serioze sin okupis je liaj originalaj verkoj, kaj lia nova religio havas precipe en Anglujo, multajn anojn. Rezulto de tiu intereso certe estas la traduko de la supre citita verko; traduko el la internacia lingvo de l' mezepoko en tiun de la nuntempo.

»The British Esperantist« skribas pri la libro: »Libro tre interesa, kiun devis posedi ne nur ĉiu studanto de religioj, sed ĉiu pensema esperantisto. La dogmoj estas tiuj entenataj en la Biblio, sed klarigataj laŭ tute nova kaj scienca maniero; ili estas do bazo de nova religio tute liberala kaj racia, kiu povas plaĉi al ĉiuj kristanoj kaj eĉ al liberpensuloj.»

Aĉetebla ĉe la Swedenborg Society, 1, Bloomsbury-street, London. Prezo 7 penoj (50 öre).

Novaj gazetoj.

»Esperanto-Revuo por Komercio kaj Industrio«, monata gazeto. Administracio: 7, Bd. Rochechouart, Paris, 9, Francujo. Abonprezo 2: — Sm. (3: 65 kr.).

»La France Esperantiste«. Administracio: 3, rue Sophie-Germain, Paris, Francujo.



Alvokoj.

Fajrob-igado kaj Esperanto.

Fajrobrigadisto el Leipzig faris statistikon pri la servrilatojn de la tutmondaj landoj fajrobrigadaroj. Li forsendis 106 demandarojn en ĉiuj landoj kaj preskaŭ ĉiuj delegitoj de la U. E. A., al kiuj estis senditaj la demandaroj, ilin resendis responditaj.

Ĉi tiu statistiko kaŭzis grandan miregon inter la esperantaj rondoj. La statistiko estos almetata en la »Esperanto pavilono» dum la internacia ekspozicio por librokomerco kaj grafikaj artoj en Leipzig, (6. V ĝis 30. X. 1914)

Por pligrandigi la sukceson de tiu ĉi statistiko kolektas nun vidaĵpoŝtkartoj kun vidaĵoj de ĉiuj fajrobrigadoj en la tuta mondo.

Oni bonvolu sendi vidaĵkarton kun vidaĵoj de fajrobrigadejoj, fajrobrigadistoj, estingilaroj bruladoj kaj tiel plu.

Ĉiu, kiu sendos vidaĵkarton ricevos belan vidaĵpoŝtkarton de Leipzig laŭ deziro. — Bonvolu adresi la vidaĵpoŝtkartojn (poŝtmarko bildflanke) al

S-ro Oswald Panzer

(Fajrobrigadisto kaj Esperantiano)
Leipzig—Pl.
Weissenfelsenstr. 54. II.
Germanujo.

Attestimaj Samideanoj.

Mi kredas ke abomeno, malŝato aŭ tiaj malbonaj sentoj inter Okcidenta kaj Orienta nacioj estas originataj el nur la malfacileco de reciproka kompreno pro la malsameco de iliaj lingvoj, kutimoj, religioj, etiketoj, ktp., kvankam tiaj aferoj similas unu alian inter Okcidentaj landoj aŭ unu alian inter Orientaj nacioj. Por forigi tiujn ĉi malŝatindajn malbonaĵojn mi nun preparadas eldoni monatan gazeton skribitan en facila Angla, Franca, Esperanta, kaj japana lingvoj por geknaboj, en kiu mi enpresos pentraĵojn kaj fotografiaĵojn de produktaĵoj de Okcidenta kaj Orienta geknaboj, kaj post la publiko mi sendos ilin al infana kaj geknaba

lernejoj en ĉiu loko tra la mondo por la iloj de reciproka kompreno kaj komparo de eduko. Ĉar la cerbo de geknaboj estas simpla kaj klera la profunde enpresitaj aferoj estos ne forgesitaj el la cerbo eĉ kiam ili atingos je maturulo. Ĉu oni ne diras »knabo estas patro de homo»? La frateco de monda popolo enpresita de tiu ĉi mondopola fratismo estas la fonto de eterna internacia paco. Mi ne dubas, ke niaj samideanoj helpos min, ĉar vi estas ankaŭ ardenta esperanto pri eterna internacia paco. Karaj Samideanoj, estu al mi bonkoraj tiel, ke vi informu la liston de *adresoj de infana kaj geknaba lernejoj* de via lando aŭ urboj, ĉar mi deziras donaci mian gazeton nun preparatan kaj sendi por interŝanĝo de la produktaĵoj de internaciaj geknaboj.

Kore via.

M. Hikosaka,

33, Abekawamachi,
Asakusa, Tokio, Japan.



Leterkesto.

S-ro Thomson Whyte, Portobello, Skotlando. — Katalogo pri sveda Esperanta literaturo ne ekzistas de la kaŭzo, ke tiu literaturo ankoraŭ estas tre modesta, kaj konsistas preskaŭ nur el lernolibroj kaj vortaroj. De tradukoj ni tamen povas citi: »Pario» de August Strindberg, tradukita de Birger Ström kaj »Fraŭlino Julie» de la sama aŭtoro, tradukita de Nylén kaj Krikortz. De sved-amerika aŭtoro, s-ro Lehman, Vendell, aperis »Sub la meznokta suno» kun rakontoj de Svedujo. Krom tio ni devas citi »Sveda kantaro», enhavanta grandan kolekton da svedaj kantoj, kolektitaj de G. Löfvenmark.



Korespondado.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

Francujo. — S-ro Robert Simon, Villa Robert, Route du Fort, St. Michel, Toul, M. et M., deziras korespondi kun svedaj samideanoj per poŝtkartoj ilustritaj.

Köp endast

FREJ-VELOCIPEDER

de äro erkänt lättgående, eleganta och i längden billigare än de flästa.

Gefle Velocipedverkstad

S. Centralgatan 18, GEFLE.

Priskurant å velocipeder och delar gratis. Återförsäljare erhålla hög rabatt.



Gävle Esperantoförening

havas ordinaran kundsidon mardon la 2-an de junio 1914 en la klubcambro S. Kungsgatan 8 je 8,30 h. vespere.

La estraro.

Från

La Esperos expedition, Gävle,
kan rekvireras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av G. H. Backman.....	1: —
Lärobok i Esperanto av P. Nylén.....	1: —
Lärobok i Esperanto av Carl Ohlsson.....	0: 50
(Alla med Esp.-svensk ordlista).	
Esperanto-språklära av O. W. Hjærtstädt.....	0: 40
Esp.-svensk och svensk-esp. ordbok av O. W. Hjærtstädt	0: 60
Svensk-esp. ordbok av E. L:son Finn	1: 50

Sveda Kantaro, kun melodioj	0: 35
Esperantista Kantaro, »	0: 75

Nova Testamento (afrankite)... 2: 50

Esperanto-stjärnor.....	0: 75
Esperantoflagga (bordsflagga)...	2: 40
d:o (något enklare)	1: 75
d:o (mindre)	0: 85
d:o d:o.....	0: 50
d:o (miniatyr)	0: 15

10:e världs-Esperantokongressens officiella vykort. 1 duss.	
1: — kr.	1 st. 0: 10
d:o reklammärken, 100 st.	
1: — kr.	1 st. 0: 02



Bär Esperantostjärnan!

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Presenter inköpta hos
Juvelerarefirman

A. U. Wahlberg, Gefle

äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET GEFLE

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

Carl Larssons

FOTOGRAFATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Sport- & Fotografiska artiklar

A.-B. Axel Karlstrand

Rikst. 1227 GEFLE Rikst. 1227

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

.....

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 1697.

Kafé Linnéa

(Nykterhetsvännernas Kafé)

NYGATAN 34 (Pousettska huset)

■ TELEFON 859 ■

Frukostar, Middagar och Soupéer.
Smörgåsar, Kaffe, The o. Choklad m. m.
Beställningar för mindre sällskap.

LOVISA HÖRLIN.

SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & C:o

PROVU LA KOPIOKRAJONON

ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Kort lärobok i Esperanto

av **Carl Ohlsson.**

Pris 50 öre.

erhålles hos författaren, adress: 2:a
Långgatan 32, Göteborg.

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

.....
Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställ ingar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 1628.

Utför förstoringar efter fotografi.
Förstklassigt arbete. Begär priskurant.

Kort Lärobok i Esperanto

för nybörjare av

ALBIN ZACHRISSON

Läroverksadjunkt, Karlstad.

Rekvireras prkontant hos förf., Karlstad.

•• PRIS 75 ÖRE. ••

Varje Esperantist

bör rekvirera Svensk-
Esperantisk ordbok av
E. L:son Finn. Innehålls-
rikaste ordbok i sttt slag
(132sidor). Erhålles porto-
fritt om kr. 1:50 sändes
pr postanv. till författaren,
— adress: *Uppsala* —



N. Lundgren

GEFLE Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 750 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.


Argenta medalo en Stockholm 1897
, , , Gefle 1901
, , , Norrköping 1906

Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

○ TELEFON 188 ○



Finna Esperantisto

Officiala monata organo de Esperanto-Asocio
de Finnlando. ○ Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: **S-ro Albin Sandström,**
11, Köpmansgatan, *Helsingfors.*

